

Solvu, lernu, ridu!

①

Per kiuj literoj vi anstataŭos la demandsignojn?

J F M A M J ? A S O N D

U D T K K S S ? N D

②

Klubo de legantoj

Revenas la rubriko! Tie ĉi estas skribitaj kelkaj frazoj dividitaj en du partoj. Sed ŝajnas, ke la frazoj estas malĝuste kunigitaj. Ĉu vi kapablas kunigi ilin ĝuste?

A: Per razilo la viroj	1: tajpas siajn literaturajn verkojn.
B: Per sapo kaj akvo homoj	2: veturas al celo, foje kun pasaĝeroj.
C: Per aŭtomobiloj ŝoforoj	3: metas manĝopecojn en la buŝon.
Ĉ: Per okulvitroj iuj homoj	4: liveras elektron al vapor-lokomotivoj.
D: Per skrib-maŝino aŭtoroj	5: razas sian barbon.
E: Per najloj oni	6: pli facile moviĝas sur neĝo aŭ glacio.
F: Per manĝiloj oni	7: lavas sian korpon.
G: Per troleo oni	8: kombas siajn harojn.
Ĝ: Per skio oni	9: vidas ĉirkaŭajn objektojn kaj legas.
H: Per kombilo oni	10: tondas paperon, ŝtofon ktp.
Ĥ: Per tranĉilo oni	11 kunigas malmolajn materialojn.

Post ĝusta kunigo de la dividitaj frazoj, vi trovos neĝustan aserton, kiun vi devas korekti. Sendu vian solvon ĝis la apero de la nova numero de *Juna Amiko* rekte al la adreso: Josef Chvosta, Dr. Horákové 16.268, CZ-29001 Podebrady, Ĉeĥio. Ĉiu solvo estos rekompencita per esperantaĵoj, belaj vidaĵ-kartoj aŭ interesaj informoj.

32 ☺☺ JUNA AMIKO 96/3-4

③

ANIMALA BAND⁹

smg

Kvin bestoj muzikas! Ĉiu kun propra instrumento. Jen la kvin bestoj:

kuniklo leporo lupo porko testudo.

Ĉiu strofo havas unu spacon. Metu la ĝustan beston en la ĝustan spacon, kaj deklamu kune la poemojn!

_____ ludas banĝon
en muzika band'.
Ĝuu la aranĝon,
tra la tuta land'!

_____ n ĉiuj aŭdas
dum li saksofonas.
La publik' aplaŭdas,
ŝatan takson donas.

Gajulo meze venas,
_____ vigle kuras.
Batilojn svinge tenas
Tre laŭte li tamburas.

Oreloj pinte staras,
cimbalegoj kraŝas!
_____ tionfaras,
dum li ritme paŝas.

Serioz-miene blovas
la _____ la trombonon;
rideti li ne povas
— englutis li bombonon!

Per la marŝ'-elano
De l'orkestra kvin',
Ĉiu en bona sano,
Bele distras nin.



④

Intermiksitaj proverboj

Bernard Golden

Tiu ĉi kvizo konsistas el 25 konataj Esperantaj proverboj, kies unuaj kaj lastaj partoj estas intermiksitaj. Post tralegado de ĉiuj 25 eroj, provu kunmeti la partojn, kiuj formas la verajn proverbojn. Jen ekzemplo:

- A. Plej bone ridas, kiam boto nin premas.
- B. Najbaro ne ĝemas, kiu laste ridas.

Estas evidente, ke la du senc-havaj proverboj estas:

- A. Plej bone ridas, kiu laste ridas.
- B. Najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas.



1. Ne ŝovu la nazon tie fajro troviĝas.
2. De tro multa scio estas plej bongusta.
3. Kiu rompis la glason, li tutan manon postulas.
4. Hundo bojas, kiu neniam ion faras.
5. Hako post hako disfalas granito.
6. Nur tiu ne eraras, — buŝo parolas.
7. Kie fumo leviĝas, homo vojas.
8. De guto post guto kreas la kranio.
9. Kie diablo ne povas, ankaŭ ombro troviĝas.
10. Ofte ĉapo de kampulo ne estas sur la hoko.
11. Se okulo ne vidas, herbo ne kovras.
12. Kiu volas mensogi, ordigu la kason.
13. Vivo sen modero estas la plej efika atako.
14. Nokte eĉ monstro ne bezonas jam ĉapon.
15. Vojon batitan koro ne avidas.
16. Nova balailo kovras kapon de saĝulo.
17. Gasto kaj fiŝo bone veturas.
18. Frukto malpermesita baldaŭ fariĝas malfreŝa.
19. Koro tro plena kondukas al mizero.
20. Donu fingron al avidulo, kiam dentoj elfalis.
21. Kiu bone ŝmiras, estas belulo.
22. Kiu perdis la kapon devas bone memori.
23. Nuksoj venis en fremdan vazon.
24. Kie lumo ekzistas, tien li sendas virinon.
25. Ankoraŭ la ezoko bone balaas.



12 ☺☺ JUNA AMIKO 96/3-4

⑤

KVIZO-LUDO

Prizorganto de la rubriko: Dieter Berndt, Germanio

1	Kion faras jenaj homoj: <i>tajlorino, ĉarpentisto, masonisto</i> ?
2	Kion vi scias pri bovino ? (5 frazoj)
3	Kion signifas jenaj mallongigoj: <i>bv. / k.a. / rim. / p. / del. / irk</i> ?
4	Decidu, ĉu <i>se</i> aŭ <i>kiam</i> ! ... <i>vi ne venos ĝustatempe, mi foriros. Li venis, ... mi ne estis hejme. ... morgaŭ ne pluvos, ni ekskursos.</i>
5	Mallongigu la frazojn helpe de <i>-ig, -iĝ</i> . <i>La kelnero metis la manĝaĵon sur la tablon. Mi metis en la buŝon grandan pecon de pano. Reveninte hejmen, mi tuj metis min en la liton.</i>
6	Ŝerca demando! Kiu libro povas flugi? (<i>E.E.Popoviciu, RO</i>)
7	Ĉe tiuj ĉi vortoj intermiksiĝis la literoj. Ĝustigu ilin! (Temas pri arbo, besto kaj mizikilo) TERNALKO, HARSTAMO, TANALPO
8	Skribu tri vortojn tri-silabajn, kiuj estas legeblaj en ambaŭ direktoj (ne konsideru la finaĵon). Ekzemplo: <i>radaro</i> (<i>M.Molnar, HU</i>)
9	Kiu artikolo en tiu ĉi numero de Juna Amiko plaĉis al vi plej multe ?
10	Faru vi mem demandon, kiu povos aperi en iu sekva numero. Ne forgesu skribi vian nomon kaj landon!

⑥ Ridu!

Renkontiĝis du amikoj, unu havis nur unu ŝuon. „Ĉu vi perdis ŝuon?“ „Ne, mi trovis unu.“

Renkontiĝis du amikinoj. „Saluton, kie vi estis?“ „En hospitalo, por testo de gravedeco.“ „Ĉu estis malfacilaj demandoj?“

Paciento diras al kuracisto: „Mi ekskrementas ĉiumatene je la sesa.“ „Vi ĝoju, ĉar regula ekskrementado estas signo de bona sano.“ „Sed kiom tio validas por mi, kiam mi vekiĝas nur je la sepa.“

Kuracisto demandis pacieron: „Do, kiajn problemojn vi havas?“ „Sinjoro doktoro, eliras al mi dentoj.“ „Ne trompu min, ĉu en via aĝo?“ „Jes, vere, mi ilin antaŭhieraŭ englutis.“

Vojaĝantoj sur unu transmara ŝipo eksciis, ke unu maristo scias rakonti bonajn anekdotojn. Ili iris peti lin iujn rakonti. Sed li diris: „Mi konas nur maldecajn, kiujn mi povas rakonti inter maristoj, sed ne al vi.“ Ili proponis, ke li diru anstataŭ ĉiu maldeca vorto *bum* kaj ke ili la sencon alpensos. Do, li komencis:

„Bum bum, bum bum bum bum, bum bum bum, bum bum merdo bum.“